# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

# IPR

## Internacia Pedagoga Ekzameno de ILEI

decidita de la komitato de ILEI - Budapeŝto 1972

kompilita de rektoro H. Sonnabend

Speciala numero 1976

Pizo, Italujo

# Regularo de Internacia Pedagoga Ekzameno de ILEI

Art. 1

**Celo**

1.1 La Internacia Pedagoga Ekzameno - IPE - de ILEI estas institucio de ILEI, kies celo estas:

1.2 internacie altigi kaj unuecigi la nivelon de lerneja instruado de Internacia Lingvo Esperanto;

1.3 atesti surbaze de konforma ekzameno la kapablon instrui Esperanton je ĉiuj lernejaj ŝtupoj, partopreni pedagogian didaktikan esplorlaboron kaj sciencan agadon.

Art. 2

**La Ekzamena Komitato de ILEI**

2.1 La Ekzamena Komitato de ILEI - EKI - konsistas el prezidanto, sekretario kaj 30 konstantaj membroj.

2.2 La prezidanton de EKI elektas la estraro de ILEI. La sekretarion kaj la konstantajn membrojn komisias la estraro de ILEI laŭ la propono de la prezidanto de IKE.

2.3 Prezidanto, sekretario kaj konstanta membro de EKI povas esti tiu membro de ILEI, kiu

2.3.1 gvidas oficialajn Esperanto-kursojn en iu universitato;

2.3.2 havas universitatan gradon, postenon, aŭ estas emerita universitata profesoro aŭ docento;

2.3.3 disponas pri ŝtata-faka universitata diplomo pri Esperanto-lingvo kaj literaturo;

2.3.4 disponas pri Dipl. IPE.

Art. 3

**La organizado de ekzameno**

3.1 Iniciati ekzamenon oni povas ligi kun internaciaj aŭ naciaj aranĝoj de ILEI, aŭ aliaj pedagogiaj konferencoj, kursoj, seminarioj, se ili estas aŭspiciataj de ILEI.

3.2 La kandidato deziranta ekzameniĝi devas sin turni petletere al prezidanto de EKI. La formon de petletero vidu: aldono I.

3.2.1 Al la ekzameno povas esti allasita pedagogo, kiu instruas en ia lernejo, sendepende de lerneja grado;

3.2.2 kandidato de iu instruista fako en universitato aŭ pedagogia altlernejo.
3.3 La kondiĉo por esti akceptata al skriba respektive parola ekzameno estas la ĝustatempa prezento de la disertacio.
3.3.1 La disertacia temo estas indikenda en la prezentiĝa petletero (vidu aldono I).
3.4 La komenca dato de la ekzameno estas la poŝta dato de la letero, per kiu la prezidanto de EKI informas la kandidaton pri la akcepto de la disertacia temo (la prezidanto rajtas modifi la temon aŭ proponi novan).
3.4.1 Post akcepto de la kandidato la prezidanto de EKI decidas pri la fondo de la loka ekzamena komisiono kaj ties prezidanto - LEK -.
3.5 La ekzamenkotizoj estos pagendaj aŭ ĝire aŭ loke antaŭ la komenco de la ekzameno.

### Art. 4

### La antaŭpreparaj kaj fermaj ekzamen-kunsidoj

4.1 Lige al ekzameno okazu du kunsidoj:
- antaŭprepara kunsido
- ferma kunsido.

4.1.1 En ambaŭ kunsidoj prezidas la prezidanto de LEK kaj devige ĉeestas ĉiuj membroj de LEK.
4.1.2 Ambaŭ kunsidoj devas esti protokolitaj. La protokolanton proponas la prezidanto de LEK. La protokolanto ne estas membro de LEK, do ne devas respondi al ties kondiĉoj. La protokolanto respondecas pri la protokoloj de ambaŭ kunsidoj, plenigas la ekzamenajn protokol-formularojn de ĉiuj kandidatoj aparte kaj subskribas. La ekzamenajn protokolojn kune kun la prezidanto devas prizorgi la protokolanto. Ĉiu ekzamena dokumento estu poŝtota unu semajnon post la ekzameno al la adreso de la centro.
4.2 Antaŭ la komenco de la skriba ekzameno okazu la antaŭprepara kunsido. La tagordo de la antaŭprepara kunsido entenu la sekvajn erojn:
4.2.1 La prezidanto disdividas la opajn ekzamenajn objektojn inter la membroj de LEK.
4.2.2 La prezidanto kontrolas la identecon de la kandidato.
4.2.3 La prezidanto disdividas la taskojn, rilatantajn al la antaŭpreparo de la ekzameno: kompilado kaj multobligado de tekstoj, tezaro laŭ objektoj, ktp.
4.2.4 LEK pridiskutas la unuecan prijuĝan principaron kaj postularon.
4.3 Post la fino de la parola ekzameno okazu la ferma kunsido. La tagordo de ferma kunsido enhavu la sekvajn erojn:
4.3.1 LEK konstatas la definitivajn juĝnotojn pri opaj studobjektoj. La proponon faras la ekzameninta membro, la definitivan noton konstatas LEK per voĉdono. Ĉe ekvilibro decidas la prezidanto.
4.3.2 Post la konstato kaj registrado de la opaj juĝnotoj oni kalkulas la meznotojn kaj la ĝeneralan kvalifikon de la kandidato. Samtempe LEK aparte pridiskutas la nesukcesintajn kandidatojn.
4.3.3 La fina laboro estas la kompilado de ĉiuj dokumentoj kaj ilia subskribo. La poŝt-pretigon prizorgas la protokolanto. Al la Centro de EKI estas sendenda:

1. Ĉiu ekzamena protokolo pri kandidatoj kaj ĉiuj ceteraj protokoloj;
2. la dosiero de la ekzameno
3. Al la sekretario de ILEI estas sendenda la kopio de la dosiero kun la kopioj de protokoloj de la du kunsidoj.

### Art. 5

### La ekzameno

5.1 La ekzameno konsistas el jenaj tri partoj:
5.1.2 disertacia
5.1.3 skriba
5.1.4 buŝa
5.2 Disertacio
Lige kun sia petletero al prezidanto de EKI la kandidato estu allasita al la ekzameno proponante temon de la disertacio.
5.2.1 Disertacia temo estas elektebla el inter jenaj ekzamenaj objektoj: lingvistiko-gramatiko, literaturo, interlingvistiko, historio de Esperanto-movado, pedagogio, metodiko.
5.2.2 La disertacio devas esti verkita en Esperanto kun minimuma amplekso de 25 tajpitaj paĝoj po 26 vicoj en tri ekzempleroj. El la tri ekzempleroj unu devas esti bindita, kun titolpaĝo. (aldono II)
5.2.3 Por skribi la disertacion la kandidato havas tempon de tri monatoj kalkulite post akcepto de la temo.
5.2.4 La binditan ekzempleron la kandidato devas sendi al la centro de EKI. Tiu ekzemplero restas en la arkivo. La duan kaj la trian ekzemplerojn li devas sendi al la recenzantoj indikitaj en la akcepta letero de prezidanto de EKI.
5.2.5 La detala analizo kaj recenzoj kun proponita juĝnoto estas sendendaj al la centro de EKI. Limdato: unu monato post ricevo de la disertacio.
5.2.6 La prezidanto de EKI post la ricevo de recenzoj kaj proponitaj juĝnotoj konstatas la finan juĝnoton, enregistras ĝin, kaj la sekretario disponigas la rezulton al la prezidanto de LEK. La rezulto konsistas el subskribitaj recenzoj, proponitaj juĝnotoj, fina juĝnoto, eble apartaj indikoj fare de la prezidanto.

### Skriba parto

5.3 La kandidato devas ellabori tri taskojn. Por ĉiu tasko li ricevas po unu horo, sekve la skriba parto daŭras tri horojn.
5.3.1 Gramatiko: testo, enhavanta 10 taskojn el diversaj ĉapitroj de la sistema Esperanto-gramatiko;
5.3.2 Literaturo: analizo de iu periodo, analizo de la verkaro de iu verkisto

aŭ de iu konkreta verko;

5.3.3 Metodiko: didaktika prilaborado de iu unuo-leksika aŭ gramatika aŭ alia, simila praktika instrumetoda temo.

5.3.4 La kandidatoj rajtas uzi vortaron.

5.3.5 Krom la kandidatoj dum la ekzameno povas ĉeesti nur la inspektanto. Kontroli ekzamenon rajtas la prezidantoj de LEK kaj de EKI.

**Parola parto**

5.4 La objektoj de la parola ekzameno estas:

5.4.1 Lingvo: La kandidato devas laŭtlegi nekonatan tekston, rerakonti ĝin, poste analizi enhave kaj stile. Li devas respondi al gramatikaj demandoj rilatantaj la tekston kiuj celas al fonetiko, leksiko, morfologio, respektive al sintakso;

5.4.2 Literaturo: La ekzamena tezo konsistas el tri demandoj: unu ĝenerala kaj du detalaj;

5.4.3 Historio: La ekzamena tezaro konsistas el tri demandoj: unu el interlingvistiko kaj du el la historio de Esperanto-movado;

5.4.4 Metodiko: La ekzamena tezaro konsistas el tri demandoj: unu nur teoria kaj du praktikaj demandoj.

5.4.5 La parola ekzameno okazu en ĉeesto de ĉiuj membroj de LEK. Se la komisiono konsistas el 3 membroj ankaŭ la prezidanto de LEK demandas, kaj unu el la membroj demandas el du objektoj.

5.4.6 La parola ekzameno ne estas publika.

## Art. 6

**Klasifikaĵoj**

**6.1** Estas kvin juĝnotoj:

1 - tre bona
2 - bona
3 - meza
4 - kontentiga
5 - nekontentiga

6.2 La kandidato malsukcesas, se la ĝenerala juĝnoto aŭ du el detalaj notoj estas sub 4. En tiu kazo la tuta ekzameno estas ripetenda.

6.3 Se la kandidato havas nur unu juĝnoton sub 4, tiam li devas ripeti nur tiun ekzamenan studobjekton, el kiu li ricevis la nekontentigan klasifikaĵon.

## Art. 7

**Validigo kaj registrado de la diplomo**

7.1 La diplomon subskribas la prezidanto kaj du membroj de LEK kaj validigas ĝin per subskribo kaj stampo la prezidanto de EKI.

7.2 Post la fino de la skriba kaj parola ekzameno la tuta ekzamena dokumentaro estas sendenda al la centro de EKI.

7.3 Ĉiuj ekzamenaj dokumentoj estas konservataj en arkivo en la centro de EKI. La sekretario de EKI registras ĉiujn indikojn en registro. La vicnumero de la registro estas samtempe la numero de la diplomo.

7.4 Ĉiu sukcesinta kandidato ricevas diplomon.

7.5 La diplomito rajtas uzi la titolon: Internacia Esperanto-Pedagogo (mallonge: Dpl. IPE)

7.6 Kontraŭ la administraj kostoj oni povas ricevi kopion de diplomo de la centro de EKI.

## Art. 8

**Financoj**

8.1 La kandidatoj pagas por la ekzamenoj al la organizanta instanco ekzamenkotizon je la sumo de 15 gld-oj.

8.2 Al la kaso de EKI estu ĝirata 40% de la sumo de ekzamenaj kotizoj. 60% estu dividataj laŭ interkonsento inter la membroj de la ekzamenkomisiono.

## Art. 9

9.1 La apelacia instanco estas la estraro de ILEI.

## Aldono 1

(prezentiĝa letero)

................................................ ........................................ ..........................
plena nomo (unue familia nomo) loko dato

Al la Ĝenerala Sekretario
de I L E I

Casella Postale 22

54100 MASSA, Italujo

Proponante min kandidato por Internacia Esperanto-Pedagogo mi petas mian allason al ekzameno.

Miaj personaj indikoj:

1. Plena nomo (unue la familia nomo)
2. Naskiĝo (jaro, loko, lando)
3. Preciza hejma adreso (lando, urbo, strato, domo)
4. Profesia titolo
5. Fakoj
6. Preciza adreso de la lernejo aŭ instituto
7. Dato de ILEI-membriĝo
8. Dato de Esperantiĝo
9. Finitaj Esperanto-kursoj (jaro, loko, grado)
10. Ricevitaj diplomoj (naciaj kaj internaciaj - aldonu kopion de la diplomo)
11. Aktivecoj por Esperanto (movado, funkcioj, gvidataj (-itaj) kursoj: kiam, kie, dato, loko, grado)
12. Literatura agado (artikoloj, libroj, beletristikaj kaj sciencaj)
13. Mi deziras verki disertacion el la fako ..................................................

pri la temo:..................................................................................................

..................................
subskribo

## Aldono 2

INTERNACIA PEDAGOGA EKZAMENO
de
I L E I

..................................................................................................

..................................................................................................
(titolo de la disertacio)

................................................
(nomo de verkinto)

................................................
(urbo, lando)

............................
(jaro)

## Aldono 2 - a

1. Post pretigo de la disertacio la kandidato certigu:
Mi deklaras, ke mi krom la aldonita literaturo kaj citoj ne uzis aliajn fontojn. Plue mi deklaras, ke mia nun antaŭmetita laboraĵo ĝis nun ne estas ie aperinta.

2. Krome: La kandidato aldonu enhavtabelon en kiu estas indikitaj (laŭ paĝoj) la unuopaj ĉapitroj.

**INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)**
Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)
Aperas trifoje jare

Provizore redaktis: G. Turin
43. rue E. Magnin
F - 25300 Pontarlier

Kontoj: 1.) ILEI-IPR
25.28.71.464-40
Bank Mees & Hope NV
Rotterdam Coolsingel 93

2.) Helmut Sonnabend - Sonderkonto
Poŝtĉekkonto n-ro 3245 66-309
Hannover

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI, escepte nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikitaj kontoj.

## I P R – Fonduso

Bonvolu helpi per via donaco al diversaj celoj de IPR-fonduso: finance helpi al IPR-ebligi abonojn en landoj havantaj valutajn problemojn-kreado de infanliteraturo-verkado de pedagogia literaturo.

Bankkonto: ILEI-IPR (fonduso), n-ro 25.28.71.464-40, Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, Rotterdam.